
nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2023

## NACIAJ KAJ INTERNACIAJ KONGRESOJ

Baldaŭ komenciĝas la alta sezono de esperantaj someraj kongresoj kaj renkontiĝoj.



Memoru ke la Universala Kongreso de Esperanto okazos ĉijare en Torino (Italio), inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto. Oni atendas ampleksan ĉeestantaron, post la problemoj okazigitaj de la monda pandemio. Jam aliĝis pli ol mil homoj, inklude de pli ol kvardek venontaj el Hispanio. Oni povas trovi ĉiujn informojn, inklude de la manieroj aliĝi, en la retejo de la LKK https://www.esperanto.it/torino2023/ kaj en tiu de UEA.

La 79-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Lignano Sabbiadoro, apudmara loko ankaŭ en Italio, inter la 5a kaj la 12a de aŭgusto, tuj post la fino de la UK. Ĝin organizas internacia teamo de spertaj event-organizantoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Vidu detalojn ĉe: https://www.tejo.org/es/eventoj/ijk2023/. Pluraj madridanoj jam aliĝis. Samtempe en la sama loko okazos la 56-a Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

La 96a SAT-kongreso okazos ĉeeste en unu el la kulturdomoj mastrumataj de francaj esperantistoj: la kastelo Greziljono. La kongreso daŭros inter la 18a kaj la 25a de julio 2023. Detalojn legu en: https://satesperanto.org/spip.php?article5076.




Iom poste, inter la 12a kaj 15a de oktobro, okazos la Hispana Esperanto-Kongreso, ĉijare en Sevilo. La unuaj informoj kaj la aliĝilo troviĝas en la retejo https://kongreso.esperanto.es/. Jam preskaŭ cent homoj aliĝis al la kongreso.

Memoru ke krom tiuj, multaj aliaj renkontoj estas antaŭvidataj por venontaj monatoj. Ekzemple, dum tiuj ĉi tagoj de komenco de junio estas okazanta la 100-a Germana Esperanto-Kongreso 2023 en Braunschweig, kaj jam en venonta semajnfino (2a ĝis 4a de junio) okazos la 118-a Skota Kongreso de Esperanto, en Paisley, apud Glasgovo, aŭ la 34-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo (Pollando). La Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-57) funkcios de la 15-a ĝis la 22-a de julio en Ventspils, la sesa plej granda urbo de Latvio.

Ekster Eŭropo ni menciu la 110-an Japanan Esperanto-Kongreson inter 21a kaj 22a de oktobro, kaj speciale la 10-an Tutamerikan Kongreson de Esperanto (TAKE), kiu okazos inter la 2a kaj 5a de novembro en la plaĝa urbo Fortalezo, Brazilo.

Vi povas ekscii pri ili kaj pri multaj aliaj eventoj kaj renkontoj pere de la retejo EventaServo.org.

## KURSOJ EN POZNANO

En la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando), jam de 1998 funkcias la internaciaj postdiplomaj studoj pri interlingvistiko por internacia studentaro enkadre de la fako Lingvistiko kaj Informmastrumado (en la Fakultato pri Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj). La surlokaj 2-jaraj studoj valoras 120 kredit-poentojn kaj donas magistran titolon (*master*), internacie agnoskatan. La 1an de junio oni malfermas la periodon de aliĝo por la kursoj 2023-24 kaj 2024-25. La lingvistikaj studobjektoj estas en Esperanto, tiuj pri informmastrumado en la angla. Pliaj informoj: https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/.

Krome, la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz, en kunlaboro kun Edukado.net kaj ILEI, denove organizas unujaran instruistan trejnadon, kiu disponigas la necesajn konojn kaj lertojn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko. Ĝi daŭras unu jaron (septembro 2023-septembro 2024), estas ĉefe reta sed necesigas partoprenon unufoje en la surloka intensa semajna sesio en Pollando (9a ĝis 15a de Septembro 2023). Detalojn ĉe: https://edukado.net/novajhoj?id=888.




## PREZENTADO EN LIBERECANA ATENEO

La 7an de majo Félix Jiménez, nome de la asocio SAT-en-Hispanio, prelegis en Liberecana Ateneo de Carabanchel-Latina, ene de eduktagoj por liberecana kulturo de EKO (socikultura memregata spaco). Li prelegis pri Esperanto kaj kultura justeco.

Ĉeestis ĉ. 15 homoj, kiuj montris grandan intereson kaj partoprenis la postan debaton.

## AMERIKAJ AMIKOJ EN NIAJ RENKONTOJ

La pasintan 22an de majo partoprenis la renkontiĝon en la sidejo samideanoj Mayra Núñez Hernández kaj ŝia filino, devenantaj el Kubo sed nun loĝantaj en Madrido.



Mayra prezentis sian libron, "Tao de la vojaĝanto", kolekto de rakontetoj, kelkaj por infanoj, rilataj al ĉina filozofio. Ĝi estis eldonita de MAS kaj estas produkto de ateliero pri tradukado en Havano.

En venonta sabata kunveno partoprenos nia brazildevena samideano Marcelo, nun loĝanta en Alcalá de Henares. Memoru ke tiu renkonto okazos la 3an de junio, en la kutima loko, la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Esperanto, num. 2, de Madrido (metrohaltejo Alsacia, lineo 2).

## PLIAJ INFORMOJ KAJ RENKONTOJ

Ni daŭrigas la renkontiĝojn en la sidejo, ĉiujn lundojn (krom la festajn) ekde la 18,30 horo. Ni proponas komunajn paroladojn, legadojn kaj deklamadojn.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com